### Pri kosta kaj multakosta

Jen kaj jen mi legas en internacilingvaj ĵurnaloj kaj periodaĵoj (bedaŭrinde ankaŭ en Scienca Revuo), ke io estas **multekosta**. Laboro kostas, nuntempe en la okcidentaj landoj eĉ multe, do ĝi estas "multe kosta" aŭ "multkosta". Ĉu tiu **lasta vorto** vere devenas el la ofta "multekosta"? En la "Ekzercaro", Zamenhofo rekomendis kunmeti simple "la vortojn" (laŭ la germana versio), "la elementojn" (laŭ la franca) kaj, pli konkrete, "la radikojn" (laŭ la angla versio).

Se PIV dokumentas la zamenhofan radikon "mult" kiel adjektivan, tiam la "vorto / elemento / radiko" estas "multa", kiun ni rajtas kunligi kun "kosta" al "**multakosta**". Aldone ni provas imagi la kreadon de la kunmetaĵo el "kun multa kosto" same kiel "longdaŭra" el "kun longa daŭro". Do la tradicia kunmetaĵo "multekosta" ŝajnas esti formita **kontraŭ la reguloj** de la lingvo. Krome ĝi estus **escepto en lingvo laŭdire senescepta**.

Regule estas, ke oni kunmetu la "vortojn / elementojn / radikojn" sen gramatika ŝanĝo. Ĉiu komencanto stumblas ĉe la esperanto-interna kunmetaĵo kaj konscie aŭ subkonscie dubas pri la unueco de la Internacia Lingvo. Nur longjaraj uzantoj estas harditaj kaj scias trankviligi sian lingvan konsciencon per relativigaj elturnaĵoj…

*Franz-Georg Rössler*
*Am Mönchsbusch 6*
*DE - 67373 - Dudenhofen* / GERMANUJO

### La solvo de la problemo pri propraj nomoj

Responde al la utila artikolo de prof. *Bociort* en SR 3/2003, p. 169 – 172: "Ĉu ankoraŭ esperantigi la proprajn nomojn?" mi verkis la sekvajn proponojn:

**A. Zoologio, botaniko, ŝtonscienco k.t.p.**

1. Ni akceptu la tre malmultajn jam oficialajn terminojn por nocioj uzataj en la ĝenerala vivo. Cetere ĉi tiuj Esperantaj vortoj **ne estas propraj nomoj**. (cervo; ranunkolo; safiro; sulfuro).

2. Por la resto de tiaj terminoj ni uzu la grekaj-latinajn formojn, kiuj ja **estas propraj nomoj**, en la latina ortografio, kaj sen prononcindikoj. (Abramis blicca; Eucalyptus miniata).



3. Nur se bezonataj, la Esperantistoj inventu kaj uzu, sed nur tre heziteme, kiel komunnomajn neologismojn – kaj la Akademio eventuale oficialigu – pliajn Esperantajn nomojn de ĉi tiu kategorio, kiuj nomoj tiukaze estos **komunaj vortoj**. (pagelo; heliantemo; tantalo).

**B. Nomoj de homoj**

1. Ni akceptu kaj uzu la malmultajn jam oficialajn terminojn por **nefamiliaj** nomoj. (Elizabeto; Johano).

2. La **familiajn nomojn** kaj la reston de la nefamiliaj nomoj (kaj, se dezirataj, la jam oficialajn) ni uzu en la ortografio de la origina lingvo, sed ĉiam en latina literumo. (Chateaubriand; Vashti).

3. Ĉe la **etna termino** oni povas parenteze aldoni la prononcon, laŭ la Fonetika Internacia Alfabeto, kaj nepre **ne laŭ la Esperanta alfabeto** (kiu kreus stultajn sonojn: Gete, Kuri).

4. Nur se bezonataj, la Esperantistoj inventu kaj uzu, sed nur tre heziteme, kiel neologismojn – kaj la Akademio eventuale oficialigu – pliajn Esperantajn nomojn de ĉi tiu kategorio, inkluzive nomojn de **klasiktempaj personoj** kaj kvazaŭpersonoj. (Karolusmagno; Kleopatro; Ateno)

**C. Geografiaj nomoj**

1. Ni akceptu kaj uzu la malmultajn jam oficialajn terminojn. (Francujo; Londono; Eŭropo).

2. La reston de la geografiaj nomoj ni uzu en la **ortografio de iliaj etnaj lingvoj**, sed ĉiam en latina literumo. (Novosibirsk; Bei Jing).

3. La Akademio nuligu siajn listojn de konsilitaj nomoj geografiaj, ĉar ili multfoje estas nelogikaj, ne Esperantecaj, kaj kelkfoje eĉ samaj al jam ekzistantaj radikoj. (La-Plato; Kubo).

4. La nomoj de popolanoj, kiuj ja estas **komunaj nomoj**, ne havu ĉefliteron, kaj ja havas la artikolon.

5. La Esperantistoj inventu kaj uzu kiel neologismojn – kaj la Akademio eventuale oficialigu – pliajn Esperantajn nomojn por internacie multe uzataj geografiaĵoj, sub la kondiĉoj, ke

a) La nova termino konsistu el nur unu vorto (ja por nur unu nocio), konsistanta el unu radiko (Laplato; Riodeĵanejro) aŭ pluraj radikoj. (Nordameriko; Nigromontaro).

b) Ĝi ne enhavu en si iujn ajn streketon, apostrofon, ĉefliteron, aŭ gramatikan finaĵon. (Lapazo; Losanĝeleso; Eburbordo; Vjetnamujo).

c) Ĝi ne samu al jam oficiala vorto kun alia signifo (Kubao; Maltao; Kanoo; Limao; Togio; Khataro).

ĉ) Ĝi estu en la singularo. (Atenurbo; Rokmontaro; Filipino; Vestindiaro; Alparo; Himalajo).

d) Ĝi komenciĝu per ĉeflitero nepre kaj nur, se en substantiva formo.

e) Ĝi ne enhavu duoblan saman konsonanton (ĉar tio estus kontraŭ la spirito de Esperanto). (Suomio por Finnlando; Boneno por Bonn; Kanso por Cannes).

f) Ĝi ne enhavu neEsperantajn literojn.

**D. Pluaj sugestoj**

a) Personomoj, ĉar uzataj por pli ol unu persono, povas kelkfoje esti en la pluralo.

b) Ankaŭ titoloj de gazetoj, libroj, teatraĵoj ktp. estas propraj nomoj.

c) La radikoj de ĉiuj propraj nomoj, escepte titolojn, estas substantivoj. (Kristino; Blankulino).

ĉ) La propraj nomoj ĝenerale ne estas en pluralo nek havas ĉe si ja artikolon escepte se kun adjektivo. (la malgranda Eucalyptus miniata, la mirinda Mirando; Danubo).

d) La ortografio de la neologismoj ne bezonas aspekti kiel la originala literumado, ĉar ilin legas (ne neEsperantistoj, sed) nur Esperantistoj – kiuj ja scias la vortojn! Ni neke bezonas sekvi la kutimon de la etnaj lingvoj, kelkfoje ŝanĝi nomon. (Pekino; Bombajo; Birmo).

*Marcelo Leereveld*
*12, Heather Grove, Belgrave South,*
*AU - V i c t o r i a - 3160* / AŬSTRALUJO

**Redakta noto:** Mi esceptokaze ne kursivigis la neEsperantajn vortojn en la supra teksto, ĉar temas pri tute persona letero de leganto. Tamen restas sciencrevua kutimo la kursivigo de ĉiuj neEsperantaj vortoj en artikoloj de Scienca Revuo (por marki ilin kiel fremdaĵojn en nia lingvo): *Abramis blicca; Eucalyptus miniata; Chateaubriand; Vashti; Gete; Kuri; Novosibirsk; Bei Jing; Bonn; Cannes.* La redaktanto



## Titoloj de "Scienca eĥo" en SR-Vol. 54 (jarkolekto 2003)

**kun indikoj de paĝo kaj temo (kun klarigo se ne ekkonebla el la titolo)**

### SR 1/2003 Vol. 54 (2003)(1) n-ro 192

sen "Scienca eĥo"

### SR 2/2003 Vol. 54 (2003)(2) n-ro 193


| | | |
|---|---|---|
| Saniga blanka vino | 106 | Med |
| Amo kaj bona amikrondo | 106 | Med: psiĥ |
| Verdaj spuroj en ruĝa medio | 107 | Med: parazit |
| Genteĥniko pereigas kotonparazitojn | 107 | Ekol |
| La ekzakta centro de Eŭropo | 108 | Geol |
| Diamantoj - la plej ŝatataj amikoj de knabinoj | 108 | Geol |
| Seka sablo por piedpremo? | 109 | Fiziko |
| La mezureble plej produktiva matematikisto | 109 | *L.Euler* |


### SR 3/2003 Vol. 54 (2003)(3) n-ro 194


| | | |
|---|---|---|
| Placebo | 165 | Med |
| Porpatruja aresto unusemajna | 165 | Lingv: psiĥ |
| Lavendo plifortigas memoron | 166 | Bot |
| Vakcinado kontraŭ gripo | 166 | Med |
| PEN malkonkorda pri signifo de interreto | 167 | Lit: info |
| Mortpuno por libro | 167 | Hist: Lit |


### SR 4/2003 Vol. 54 (2003)(4) n-ro 195


| | | |
|---|---|---|
| Homa vidkapablo | 217 | Med |
| Senfoliigo de arboj | 217 | Bot |
| Glukozo | 217 | Bot: Fiziol |
| Tiom da fungoj | 218 | Bot |
| Nocio ekŝanĝeliĝas | 218 | Zool: nomenkl |
| Interna horloĝo | 218 | Geol |
| La plej malgranda ulo | 219 | Zool |
| Ek en la sudon | 219 | Zool: birdoj |
| Kaŝtanoj el Hispanujo | 219 | Hist: Nutr |
| Ŝanigi sin stulta | 220 | Med: psiĥ |
| Nekanonaj apokrifoj | 220 | Hist: Lit |